

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj jun UN kaj Unesko)

# esperanto

## Kiel skribi por gazetoj

La sperto montris al ni, ke el niaj okazaj aŭ kutimaj korespondantoj, relative tre malmultaj scias skribi gazetartikolon en tia formo, ke ĝi, post legado povas esti rekte transdonata al la presisto. Plej ofte ni devas plene korekti la ricevitaĵajn artikolojn, ilin trakorekti kaj eĉ kelkafoje reverki.

Tio trudas al ni longan laboron, kiu povus facile esti evitata se niaj korespondantoj atentus kelkajn tre simplajn regulojn. Plie, la fakto, ke ni estas devigataj plene korekte aŭ refari ne estas sen danĝero por la verkintoj mem, kiuj ofte plendas pri mallongigo aŭ kripligo de siaj prozaĵoj, dum sole ili mem estas kulpaj pro maklareco aŭ malkoncizeco.

Ĉu oni do permesas, ke uzante nian sperton, ni donu kelkajn konsilojn al la personoj, kiuj verkas por Esperantaj gazetoj? Antaŭ ĉio ni parolu pri la enhavo mem.

1. Oni respektu Esperanton same kiel ĉian ajn nacian lingvon, t.e., praktike, oni skribu artikolojn nur, kiam oni sufiĉe scias Esperanton. En tiu rilato, progresoj nepre devas esti farataj. La pli granda parto el la ricevitaĵaj de ni manuskriptojn enhavas erarojn, kiuj povus esti evitataj, se la skribintoj zorge relegus sian manuskripton aŭ, en okazo se ili ne estas certaj pri sia lingvoscio, ĝin komunikus al sperta Esperantisto, antaŭ ol ĝin sendi al redakcio. Sendube, Esperanto estas facila lingvo. Tio ne malhelpas, ke oni devas ĝin studi gramatike kaj stile, antaŭ ol verki por gazetoj. Neniu kuraĝus skribi artikolojn en fremda lingvo post du monatoj de studado. Tion tamen faras kelkaj bonintencaj samideanoj, kiuj tuj kiam ili sendis artikolon al iu gazeto konsideras, ke tio kronas ilian lingvoscion de Esperanto. Eraro. Kiom da konataj Esperantistoj ne ankoraŭ sukcesas korekte skribi Esperanton kaj verŝajne neniam sukcesos, ĉar ili opinias, ke ili posedas ĝin tute bone!
2. Ĉar ĉi tie speciale temas pri Esperanto, oni verku aŭ traduku nur tiujn artikolojn, kiuj akordiĝas kun la celado de nia gazeto. Tre ofte ni devas forĵeti manuskriptojn, kiuj aludas pri pure nacia fakto kaj, ho ve! ofte en tia formo, ke ĝi estas pli-malpli ofenda por alia popolo. Oni ankaŭ ne sendu artikolon pri ia ajn malgravaĵo, pure loka, aŭ pri fakto, kiun priparolis ĉiuj aliaj gazetoj de l' mondo. Laŭ la artikoloj jam aperintaj en nia rubriko "Socia Vivo" oni facile povas vidi, kiujn artikolojn ni preferas kaj deziras. Ni antaŭ ĉio deziras, ke Esperanto estu serioza, utila dokumentilo kaj interŝanĝilo de ideoj kaj sociaj spertoj, konservante tamen sufiĉe popularan karakteron.

3. Kiam oni sendas al mi notojn pri Esperanta movado (kaj tiajn ni deziras multnombre ricevadi), oni estu preciza kaj konciza. Multaj personoj longe priskribas feston aŭ paroladon, sed ne diras, kiam ĝi okazis kaj kiom da personoj ĉeestis. Por tiaj novaĵoj oni uzu telegraman stilon. La manko de loko devigas nin forigi ĉiuj komentariojn kaj priskribojn, kiuj pro sia sameco ne plu estas interesaj. Ĉiuj scias, ke Esperantoj paroladoj aŭ festoj similas unu la alian, ke la paroladisto estis "eklokventa", ke F-ino X "kantis bonege", ke la balo estis "tre ĝoja", ke nia "kara lingvo" progresas kaj ke telegramo estis sendata al nia "genia majstro". Multaj faktoj per malmultaj vortoj, tia estas nia devizo. Agante tiel oni evitos al si vanan penon por skribi vortojn, kiuj estos surstrekataj de nekompatema korektanto... Same gravaj estas la rimarkoj, kiujn oni povas fari pri la formo mem de la manuskriptoj.

1. Kiel oni devas respekti Esperanton, tiel same oni devas respekti la redaktoron kaj la presiston, t.e, praktike esprimite, skribi legeblajn manuskriptojn. Kiom da personoj skribas manuskriptojn tute kiel privatan leteron, senorde kaj nelegeble, eĉ skribas artikolon sur la sama folio kiel la leteron, sen ia konsideron pri la posta represo.
2. La legebleco de manuskripto dependas ne nur de la literoj, sed de ĝenerala aspekto. Artikolo, kies literoj estas bone skribitaj, estas tamen malfacile legebla, se la sribado estos tro densa, se la interliniaj spacoj kaj la marĝenoj estas mallarĝaj. Oni lasu eble plej multe da spaco kaj ne ŝparu la paperon.
3. La diversigo de la tipografiaj tipoj (dikaj aŭ kursivaj literoj, literegoj, literetoj) estas montrata per specialaj substrekoj, kiujn la plimulto de la skribantoj ne povas koni (escepte se ili mem rilatis kun presistoj). Ili do evitu ĉiun ajn substrekon aŭ similan signon, kiuj povus nur konfuzigi la kompostiston. Aldonado de tiuj signoj estas la tasko de la korektanto de l' artikoloj.

Resume: skribu legeble, sur unu flanko de la paperfolio, lasante larĝajn marĝenojn kaj interspacojn, substrekante neniun vorton.

Se via manuskripto konformiĝas al la supraj reguloj, ĝi ĉiam estos favore kaj ĝoje akceptata de la redaktoro, kiu zorgos pri ĝia plej baldaŭa apero. Se ne...

---

**Hector Hodler, en la revuo Esperanto, VIII-a jaro, N-ro 132 - 20 Oktobro 1912.**

## Ŝparu paperon!

Oni sendu kontribuojn por la revuo Esperanto de la 21-a jarcento al [redakcio@revuoesperanto.org](mailto:redakcio@revuoesperanto.org)

Preskaŭ ĉiuj konsiloj kaj admonoj de Hector Hodler ankoraŭ validas. Post la apero de la januara numero, la redaktoro vaste informos pri la novaj gvidolinioj de la tute nova revuo, fondita de Paul Berthelot kaj ekde Hector Hodler tre zorge kaj kompetente redaktata de multaj brilaj

# Redaktoroj

## Redaktoroj de gazeto Esperanto 1905-1946

- 1905-1907: Ch. Lambert
- 1907-02-12 ĝis 1920: [Hector Hodler](#)
- Aprilo kaj majo 1920: sen indiko de redaktoro (en [Bern](#); marto estis la lasta kun vivanta Hodler (“direktoro”))
- Junio 1920 ĝis julio 1934: [Edmond Privat](#), [Ĝenevo](#) (ekde oktobro 1920 redakcia adreso en Ĝenevo)
- Aŭgusto-septembro 1934 - : sen indiko de redaktoro, en Ĝenevo
- Januaro 1935 ĝis januaro 1936: Robert Kreuz, en Ĝenevo
- Februaro 1936 ĝis julio 1936: M. Movo ([Michael Wittenberg](#)), en Ĝenevo
- “Esperanto” de la [Ĝeneva UEA](#): 1936 ĝis 1942, 1946: [Hans Jakob](#) (laŭnoma indiko de redaktoreco nur ekde la numero de 1939-01-15)

## Redaktoroj de Esperanto Internacia 1936-1947

- Oktobro 1936 ĝis aprilo 1940: [Teo Jung](#), en [Nederlando](#)
- Majo-junio 1940 ĝis aprilo 1947: sen indiko de redaktoro, en [Heronsgate](#) (fakte ĉefe [Cecil Charles Goldsmith](#), laŭ Esperanto, 1953, februaro, p. 64, [Mason Stuttard](#) de 1946 ĝis kunfandiĝo)

## Redaktoroj de revuo Esperanto ekde 1947

- Majo 1947 ĝis julio-aŭgusto 1955: [Hans Jakob](#), en [Svislando](#), honorofice (parte kun redaktoroj [Mason Stuttard](#), [Reto Rossetti](#); en Bulonjo 1955 Jakob nomumita “honora redaktoro”)
- Septembro 1955 ĝis oktobro 1955: [Reto Rossetti](#), en Anglio
- Novembro 1955 ĝis julio-aŭgusto 1958: [William Auld](#), en Skotlando
- Septembro 1958 ĝis decembro 1960: [Kirsten Zacho](#), parte kun H. V. Rasmussen, en Danio
- Januaro 1961 ĝis novembro 1962: [William Auld](#), en Skotlando
- Decembro 1962 ĝis aprilo 1974: [Victor Sadler](#), en la [Centra Oficejo](#) (1970 ĝis aprilo 1973 kun [Akiko Ŭusink-Nagata](#))
- Majo 1974 ĝis majo 1984: [Simo Milojeviĉ](#), en la CO
- Junio 1984 ĝis julio-aŭgusto 1986: [Geoffrey Sutton](#), en la CO
- Septembro 1986: [Osmo Buller](#) kaj [Simo Milojeviĉ](#), en la CO
- Oktobro 1986 ĝis decembro 1986 : Osmo Buller kaj [Mark Fettes](#), en la CO
- Januaro 1987 ĝis decembro 1991: [Mark Fettes](#), en la CO
- Januaro 1992 ĝis decembro 2001: [István Ertl](#), en la CO
- Januaro 2002 ĝis decembro 2013: [Stano Marček](#), en Slovakio
- Januaro 2014 ĝis...: Fabricio Valle, en Brazilo

[http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto\\_\(revuo\)#Redaktoroj](http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto_(revuo)#Redaktoroj)

Fabricio Valle konscias pri sia granda respondeco kaj strebados ĝisfunde por plenumi bone la taskon konfiditan al li de la nuna estraro de UEA.

